



Informoj:
Arto :- Literaturo
Turismo :- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

NUR POR ESPERANTO

En la pasinta numero de Nia Vivo ni diris ke en tiu ĉi, ni publikigos novaĵojn, kiu surprizis niajn amikojn.

Kelkaj el ili sin turnis al ni por tuj scii iom pri tiu «surprizo», sed ni preferis daŭrigi ilian scion nenion respondante ĝis, kiam ili legos Nia Vivo. Jen, nia nova laboro por Esperanto kiun, ni estas certaj, ŝatos ĉiuj kiuj amas nian karan duan lingvon.

Nia klera fratecano S-ro Vicente Inglada faris al ni sugeston, pri kreo de kvazaŭ supera kurso per poŝto cele al perfektigo de niaj kamaradoj pri bonstila esperante verkado. Ni tuj ĝoje akceptis tiun indan ideon. Kelkajn leterojn ni interskribadis por plani la aferojn, kiu estas la kreado inter hispanaj Esperantistoj de klubon nomota

«RONDO FRATECO»

Kies ĉefa celo estas, kiel ni diras, perfektigi ĝiajn membrojn en la konado de Esperanto pere de korespondado kaj korektado de tekstoj de ili verkitaĵoj, originalaj aŭ tradukitaĵoj sed ne elprenitaĵoj de gazeto aŭ libro esperanta nek pritraktantaĵoj demandojn politikajn, religiajn aŭ trospecialajn, kiuj povus naski interdisputojn.

Por automatigi tian celon rondiros inter ĉiuj membroj kiuj ricevos laŭordan numeron gazeto kie ĉiu rondiranto skribos la tekston proponitan por korektado kaj sendos ĝin al la sekvanta linmembro kune kun la ricevitaĵo pere de la antaŭulo post korekti ĉi tiujn lastajn laŭ sia kriterio.

La Rondo estas direktata de Rondestro, elektata voĉdone ĉiudujare.

Ĉiu Rondo havos nur dekdu membrojn: tiel ĉiu rondiro de la gazeto daŭros ĝuste du monatojn. Se la membroj deziras ricevi ĝin ĉiudumonte, unu gazeto sufiĉos. Se ĉiudumonte oni rondirigos duan gazeton, unu monato ĝuste post la unua. La rondanoj voĉdonos por la unua aŭ dua solvo. La dekdu unuaj petantoj formos la Rondon. Kiun ni nomos «Rondo Frateco la unua». Se ni ricevas pli da petoj, tiuj ĉi anstataŭos, orde, la okazajn en la «unua», ĝis kiam ni havos aliajn dekdu

membrojn per kiuj ni starigos «la duan» kaj cetero.

Ni havas provizoran regularon por tiuj «Rondoj» kiu fariĝos definitiva post unu jaro dum kiu la membroj proponos ŝanĝojn aŭ aldonojn por decidi pri ĝia definitiva teksto.

Vi, do, karaj legantoj jam scias kia estas nia «surprizo». Ni fide esperas ke vi bone ricevos tiun ĉi esperantan laboron, kiun Frateco faras kaj ke multaj partoprenos en ĝi.

Kiu estos la unua rondiranto? Kiu estos la unua rondestro? Ni atendas viajn respondojn.

FRATECO.

HOMANIMAJ CELOJ

Kiam homo sin metas en tuŝo kun Naturo en ĝi mem, senigite je ĉiuj ecoj rilatantaj al individueco, li ekprovas ian nedifineblan senton, ian specon de antaŭsento pri senfineco. Sidiĝu apud la maro, sur izola bordo: aŭskultu la malakran plaŭdobruon de la dissaŭmanta sub viaj piedoj ondaro aŭ la siblon de ilin agitanta vento; kun okuloj fiksitaĵoj al tiu senlimaĵo rigardu la dubebluan linion, kiu kunigas ĉielarkojn kun oceana akvaro; loku vin en vastan kaj izolatan ebenajon, aŭ en mezon de centjararba arbaro; en nokta silento rigardadu la firmamenton, sur kiu estas dissemitaĵoj astroj, kiuj trankvile daŭrigas sian iradon, kiel ili ĝin daŭrigis multajn centjarojn antaŭe kaj ankaŭ daŭrigos centjarojn poste; sen peno, sen ia ajn klopodo, fordonu vin al propraj celoj de via animo kaj vi konstatos, ke el ĝi sentoj elfluas, kiuj ĝin profunde tuŝas, ĝin altiĝas super sin mem kaj kvazaŭ ĝin absorbas en senfinecon. Ĝia individueco malaperas antaŭ ĝiaj propraj okuloj: ili sentas la harmonion, kiu prezidas la grandegan tutajon, el kiu ĝi formas malgrandegan eron; en tiuj solenaj momentoj la genio ja kantas, inspirita per la grandiozaĵoj de religio, kaj detiras randangulon el vualo, kiu kovras antaŭ la okuloj de la mortemuloj la brilegan tronon de la Supera Kreinto.

Tiu grava, profunda, kvietita sento, kiu nin forkaptas en similaĵoj okazoj havas nenian rilaton al

individuaĵoj: ĝi estas ekspansio de la animo, kiu sin disvolvas ĉe tuŝo kun Naturo, kiel matena floro ĉe la sunaj radioj; ĝi estas Dia altiro per kiu la aŭtoro de la tuta kreitaro nin levas dum mallongaj momentoj de tiu, sur kiu ni rampas polvamaso. Tiamaniere konformiĝas intelekto al koro; tiel tiu ĉi antaŭsentas, kion tiu konas; tiel oni avizas laŭ diversaj vojoj, ke la ekzercon de niaj kapabloj ni ne kredis limigita je la mallarĝa irejo, kiun oni difinis al ni sur la tero: ni gardu nin glaciigi la koron per la malvarmo de sensenteco kaj estingi la intelektan torĉon per la ruiniga blovo de skeptikeco.

El «Fundamente Filozofio», de Jaime Balmes (1810-1847), tradukis,

VICENTE INGLADA.

Madrido.

FALANTAĴ FOLIOJ
(el Millevoje: 1782 - 1816)

Jen l' aŭtuno: sub l' arboj la tero
Per malvivaj folioj kovriĝis
Ne plu estas l' arbara mistero
Najtingala la voĉo mutiĝis.

Gastan fojon malsana junulo
L' arbojn iam amitajn trairis
Malrapide. Kun larm' en okulo,
Mortigante li, sola, ekdiris:

«Do, adiaŭ, arbar' funebranta
Kiu montras la volon de l' sorto:
Ĉar en ĉiu folio falanta
Por mi, ho, vel rebrilas la morto!

Eskulapo per ĝusta difino
Min kondamnis: l' arbarfoliaro
Tuj flaviĝos kaj via la fino
Koincidos kun tiu de l' jaro.

Al vi morta cipreso nur restas;
Je l' aŭtuno simila vi estas
Kaj al tombo vi baldaŭ kliniĝos
Viaj rozoj velkiĝos por ĉiam
Eĉ pli frue ol herbo, tuj kiam
La vinberoj apenaŭ oriĝos!»

Mi mortiĝas pro sorto egala,
Pro l' elspezo glacia de l' tempo!
Kaj simila je fum' malreala
Vaporiĝis la bela printempo.

Falu, falu, en tiu solejo,
Folietoj, kaj kaŝu la teron,
Por ke l' vido de mia tombejo
De l' patrino ne rabu l' esperon!

Kaj se en l' aleo izola
L' amatino kun hara malordo,
Venus plori vespere, tutsola,
Brue veku, ĉe tiu ferspordo
Mian ombron jam konsoliĝantan».

Li parolas... foriras... por ĉiam,
Ĉar li vidis apenaŭ falantan
La folion ĵus lastan. Post kiam
Ĝi forfalis, la tombo lin prenis.
L' amatino neniam alvenis.

Restis sola la ŝtono konstante
Ĉiam restis izola l' aleo;
Nur paŝtisto ĉesigis paŝante
La silenton de la maŭzoleo.

El franca lingvo, tradukis,

G. PHILIPPET.

HELPAMO

El ĉiuj virtoj kiuj beligas homon, neniun, laŭ mia opinio, tiel simpatia kaj tiel estiminda kiel la helpemo. Estas, vere, tiu ĉi tiel bela eco tro ofte akompanata aŭ ĉirkaŭata de aliaj cirkonstancoj, kiuj malpligrandigas kaj senefikas ĝian gravecon. Eble ago, kiun, juĝita apartigante ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, oni kvalifikas ofte kiel helpema, povas rezulti eĉ malaprobinda, studinte tiujn ĉi, se la nura celo, kiun volas atingi la aginto, estas la vanteco aŭ la egoismo. Mi, kompreneble, ne traktas pri tiu ĉi sed pri vera helpemo, tio ĉi estas: pri tiu kiun oni praktikas ekskluzive por fari la bonon al la similulo sen deziro esti vidita kaj sen espero de rekompenco proksima aŭ malproksima el tiu kiu rezultas profitita per la favoro.

Kiel konsekvenco, la agoj kiuj rezultas pli malmindaj estas tiuj kiuj ofendas homan deziron fari la bonon al la similuloj.

Iafoje, antaŭ malmulte da tempo, mi estis vojaĝanta en la vilaĝon kie mia familio loĝas. Mi lasis la vagonaron por supreniri en aŭtomobilon je la stacidomo pli proksima al la citita vilaĝo. Kiam mi alvenis al la aŭtomobilo, ĝin trovis preskaŭ tute okupata. Tamen dank'al la malgrandeco de mia pakajo kaj al mia facilmoveco, mi povis, kvankam malfacile, akomodi min.

Sed ne ĉiuj ĝin efektiviĝis. Tri ciganinoj, ordinare vestitaj, kunportante kvar malgranduletojn ĉifonajn kaj nudpiedajn, estis klopodantaj por atingi sidejon en la veturilo. Iliaj klopodoj rezultis senefikaj kontraŭ la protestoj de kelkaj vojaĝantoj, precipe fraŭlinoj, kiuj argumentis pli ol neeblecon pro manko da spaco, la malsamecon de rasoj.

Ree insistis la ciganinoj petante ke, kvankam ili ne, almenaŭ siaj filinetoj estus akomodataj. Vanaj estis iliaj petoj, kvankam kelkaj okupantoj apogis ilin. Iliaj petoj estis responditaj per neoj kaj eĉ per insultoj.

La aŭtomobilo ekmarŝis kaj la tri ciganinoj restis tie pretaj por vojiri piede kun siaj kvar infanetoj ĝis la vilaĝo.

Kelkaj fraŭlinoj ankoraŭ estis komentariantaj sian grandegan heroaĵon...

Dume, mi pripensis: Mensogo ŝajnas ke tiuj ĉi fraŭlinoj hodiaŭaj estu la morgaŭaj patrinoj!

Feliĉe tiaj fraŭlinoj estas tre maloftaj en Hispanujo.

Denove, pensante kelkfoje pri ĉi tio, prezentigas al mi la Zamenhofa imago, kies vivo estis tute dediĉita al la kunigo de la tuta homaro per Esperanto, dezirante malaperigi la malamon inter la tutmondaj homoj pro la sola diferenco de rasoj.

FERNANDO ETAYO.

MIA POSTMORTA VOLO

Du aferojn mi havas
kiel mian amcelon:

La Hispanan stardandon
kaj la nian verdstelon.

Por defendo de tiuj
du multkostaj trezoroj,
mi oferos la sangon
kaj eĉ ĉiajn klopodojn;

Kaj por kiam mi mortos,
de la filoj mi petas
kovru mian la korpon
flag'hispana kaj verda;

Kaj ke poste, por fino,
ĉirkaŭ mia la ĉerko,
kantu miaj amikoj
la Zamenhof-Esperon.

M. C. B.

:-: ĈE KATEDRALO :-:

Promenante tra tiuj stratoj silentaj kiel se ili apartenus al io jam morta, mi preterpasis antaŭ mezepoka katedralo, kaj kurioze en ĝin mi eniris mirante ĝian grandecon. Tiel mi estis nun rigardante skulptaĵojn, nun fenestrojn kolorvitrajn same kiel lumajmurtapiŝoj; sed tio kio plej altiris mian atenton estis la altegaj kolonoj kunmetataj de nervoj kiuj supre disvastiĝis kiel palmbranĉoj. Rigardante tiujn nervojn tre altajn sur nia kapo, mi pensis ke la homo ne estas ĉiopova (ĉu estas iu?) sed jes kapabla por multe. Ĉiu el la nervoj ŝajnis al mi dek, cent aŭ milo da voloj kaj la ogivo aperis al mi kvazaŭ kunigo de tiuj homaj voloj. Kelkaj generacioj fidis pri io kaj jen ilia laboro: La katedralo kiun mi vidis.

Ni kiuj amas la zamenhofan ideon, povas konstrui ankaŭ ne katedralon ĉar jam sufiĉas, sed jes societon kie la nekompreno kaj la malamo estus forigitaj. Almenaŭ ni penu tion, disvastigante la celon de Esperanto kaj inter-rilatigante kun niaj nekonataj fratoj kiuj ne parolas hispane; tiama-niere ni konos unu la alian.

ARTEMULO.

PRI LA BOKSADO

Boksado estas nobla sporto ĉar la vera graveco de tiu sporto estas devigi la praktikantojn submetiĝi al la reguloj pri fizikkulturo kaj samtempe studi profunde la homan korpon.

Se oni pruvus la veron pri la pugnobatalo, malpligrandiĝus la nombro de tiuj kiuj konsideras ke boksado estas sovaĝa sporto.

En Zaragoza bedaŭrinde ekzistas nek gimnastikejo nek boksinstruantoj, sed la emo ekzistas, laŭ oni vidas en kelkaj noktokunvenoj organizataj, malbone aranĝitaj pro tio ke la boksamatoroj sin trovas forlasitaj.

La zaragozaj ĉeestantoj en tiuj ĉi kunvenoj montras ke ili ŝatas la pugnobatalon kaj bedaŭras ke tiuj festoj ne estu pli oftaj.

Mi vidis kelkajn boksoluktadojn kiuj pli vere ŝajnis stratbataletoj ĉar la kapabloj korpaj kaj sciencaj estis pruvitaj de niaj boksoamatoroj, pri kio kulpas la manko de gimnastikejoj kie oni povus praktiki korpokulturon kaj la unuajn paŝojn en la komencoj de la malfacila arto de Fitzsimmons.

ABAD KAJ CONEJERO.

Madrid.

MIA UNUA VERKAĴO

(Daŭrigo)

Karolo diris: —Bone, se vi ne rabas jam rabos mi, kaj poste li prenis grandan ŝtipon kaj forte batis Petron, sed Petro ankaŭ estas kuraĝa kaj tiel batis Karolon kaj Karolo lin ke iliaj korpoj restis tute kovritaj per vundoj. Ankaŭ oni diras ke Karolo estas kiu rabis la monon kiun la edzino de la vilaĝestro havis kaŝita en sia ĝardeno. Pro tio Petro estas portata en sian hejmon, sed Karolo baldaŭ estos kondukata en urbon por resti en la malliberejo.

III

Post unu monato, Petro jam estis tute sana sed sia filino jam ne vokis lin, ŝi jam ne konas siajn gepatrojn, ŝiaj okuloj ne vidas nek aŭdas siaj oreloj; la morto volis suferigi ŝin longe. La malfeliĉa patrino estis preskaŭ freneza kaj la kuracisto diris ke li jam ne povis fari plu.

La infanino mortis, kaj restis tiel delikata la sano de la patrino ke, laŭ la kuracisto, ŝi devus foriri el la vilaĝo, sed kiel, se al Petro oni jam ne donas laboron en la sukerfabrikejo, ĉar li intencis rabi.

Kiom da honto sentis li, kaj plie se ili ne foriras el la vilaĝo kaj li ne gajnas monon, sia kara edzino eble mortos.

Petro iris piede, kaj preskaŭ sen manĝi, urbon por serĉi laboron, sed en la urbo estis multaj senlaboruloj. Li tage vagis en la urbo kaj nokte dormis apud la rivero sub granda ponto.

Li petis almozon, sed kiu donas almozon al juna kaj forta viro?

Li revenis hejmen kun malplenaj poŝoj kaj plenvunditaj piedoj. Lia edzino kiun flegis najbarino estas tre malsana pro la manko de manĝaĵoj.

Petro iris en la sukerfabrikejon kaj parolis kun sia estinta estro.

—Sinjoro, donu al mi laboron!

—Mi ne povas doni laboron al kiu akompanis rabiston por rabi ĉi tie.

—Vi eraras, sinjoro, ĉar mi ne permesis rabi.

—Jam mi scias, sed vi unue pensis rabi.

—Mi petas al vi pardonon; se vi ne kompatas min, mia edzino mortos.

—Mi pardonas vin, sed mi ne donas al vi laboron.

—Do kompatu min kaj bonvolu doni al mi almozon por aĉeti kuracaĵojn ĝis kiam mi gajnos monon.

Post dekvin tagoj la edzino de Petro estis mortinta pro mizero, kaj li preskaŭ freneza malbenis ĉiujn homojn kiuj povante ne kompatis lin kaj freneze decidis sin mortigi.

Li pendigis ŝnuron je arbo por sufoki sin per ĝi sed li aŭdis plendon. Tiam li vidis du belajn knabinojn el kiuj unu estis konsolantan la alian.

Petro demandis:—Kio al vi okazas, fraŭlinoj?

—Mia patro estas malsana kaj la kuracisto diras ke li bezonas sangon de juna kaj forta viro, se ne, li mortos.

—Mi donas al li mian sangon.

La du knabinoj rigardis lin per stranga rigardo kaj diris tiu kiu estis ploranta.

—Ĉu estas eble?

—Jes, fraŭlino tre volonte!

—Ho! dankon, venu! venu en mian hejmon kaj se vi donas vian sangon al mia patro, li bone pagos al vi.

—Kie vi loĝas?

—Mi loĝas en la sukerfabrikejo, mia patro estas la estro de la laboruloj.

—Bone, mi iras.

Petro pripensis: mi estas dononta mian sangon al li kaj antaŭ malmulte da tagoj li ne volis doni al mi laboron nek almozon por savi mian edzinon. Sed por mi la vivo estas sentaŭga kaj li ankoraŭ havas filinon kiu amas lin.

Petro donis sian sangon por savi sian estintan estron, sed li restis tre malforta, kaj li dezirante morti rifuzis kuracaĵojn kaj nutraĵojn li mortis kaj lia lito estis ĉirkaŭata de tuta la familio de sia estro, kiu ploris dankante.

PILAR SALVO.

SCIIGOJ

Hispanujo.—La 15^{ma} de decembro okazis la Festo de l'Libro de Esperanto, plensukcese, ĉe la Grupo «Barcelona Stelo» en Barcelono.

Multnombre ĉeestata kaj sub la prezido de fervora samideano Sro. Rodellar, partoprenis reprezentantoj de ĉiuj lokaj grupoj esperantistaj; faris paroladojn Sro. Alberich, prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, Sro. Valdepeñas, prezidanto de Zamenhof-Instituto kaj ceteraj. Bela eksposicio de libroj kaj esperantaĵoj estis elmontrataj de Sro. Montserrat, vicdelegito de U. E. A. kaj reprezentanto de Iberia Esperanta Servo.

Resume, laŭ la prezidinto, firme kaj konstante, estos festata venontan kaj sekvantajn jarojn de Barcelonaj esperantistoj la naskiĝo-tago de nia majstro Dro. Zamenhof.

Por la familio de S-ro Floria.—«Frateco» malfermis monkolekton por la familio de nia malfeliĉa samideano. Ni publikigos la nomojn de la donintoj. Jen estas:

(Daŭrigo)

Antaŭa sumo, 587'75; S-roj: E. Fernández, 1; E. Gil, 3; E. M., 2; F-ino A. Núñez, de Pamplona, 10; S-roj: Soler y Valls, de Barcelona, 10; A. Mármol, de Villanueva de las Minas, 2; J. Morós, 2; Grupo esperantista «Gerona Espero», de Gerona, 10; J. Miró, de Gerona, 5; J. Pérez Cañete, de Ateca, 5; E. Gil, 3; R. Almada (Deputato), 25; F. Redondo, de Palma de Mallorca, 3; A. Orte, San Sebastián, 5; A. Agustín, Dúrcal, 2. Sumo, 675'75.

SPRITAĴOJ

Vilaĝano iris en Amerikon. Kiam li supreniris el ŝipo vidis, ke du submaesploristoj eliras marŝante el la maro, kaj la vilaĝano tre surprizita diras al la ŝipestro:

—Vi devis diri al mi, ke oni povas alveni piede kaj mi ne elspezus monon por la vojaĝo.

Edzo kaj edzino iris promeni sur la maro en boato. La edzo komencas marmalsaniĝi, kaj la edzino diris kare al li:

—Pro Dio, Gutiérrez, gardu en la poŝo vian dentaron por ke ĝi ne falu en la maron.

Kantisto en la teatro:

—La pluvo ĉesis; la maro estas trankvila...

Aŭskultanto elirante rapide:

—Mi profitas la okazon...